**SOVETIA ESPERANTISTA JUNULARA MOVADO**

# Aktuale

## SEJM

A K T U A L E

Monata informilo de Sovetia Esperantista Junulara Movado

La agadjaro 1978/79 N-o 4(58) Decembro

## OrSEJT ESTOS ĈIAM!

Tiel decidis pli ol 160 partoprenintoj el 40 loĝlokoj de Soveta Unio (plejparte - orientanoj), kolektiĝintaj ĉi-jare en Altaja regiono, surborde de bela lago apud vilaĝo Zavjalovo.

I. Paroliga periodo.

Mi vizitis du tendarojn, kie estis organizitaj PP-oj: tiujn en Ustj-Kamenogorsk kaj Tiĥvin. Komparante mi certigas la legantojn: la Paroliga Periodo, organizita de Barnaula E-klubo, estas plej bona laŭ organizo kaj laŭ rezultoj.

Jenaj pozitivaj flankoj estas notindaj:

1) La barnaulanoj preparis ĉion bezonatan plejparte antaŭe. Ili dividis la tendaranojn laŭ grupoj. Ĉiuj 10 grupoj estis sufiĉe bone kompilitaj kvante kaj kvalite (laŭ sekso, ago, kapabloj). Ne estis kulpo de la mastroj, ke ne venis multaj indaj geaktivuloj kaj iom mankis spertaj gvidantoj kaj instruistoj-edukistoj. Tutegale la bezonatoj troviĝis kaj ĉiuj grupoj havis interesajn gvidantojn: N.Snastina (Barnaul), E.Tartiŝev (Kirov), A.Ŝarov (Permj) kaj ceteraj ne malpli kapablaj.

2) Malgraŭ mankoj, la PP-grupoj estis sufiĉe ekipitaj per turistaĵoj kaj manĝaĵoj. La turistajn gvidantojn ili fakte ne bezonis, ĉar la vojplano estis simpla (ĉirkaŭ la lago) kaj ankaŭ laŭ reliefo ne komplikis.

3) Estis sufiĉe saĝa ago flanke de la grupestroj: ili ne foriris kun siaj grupoj "diablo scias kien", sed faris konstantajn bivakojn je distanco proksimume 1 - 2 km. Lasante en la tendaretoj deĵorantojn, la grupoj kutime 2 - 3 horojn tage promenis, ekskursis, sed, kiel vi komprenas - sen "ĉevalaj devoj", ne portante sur la ŝultroj aĵojn. Do estis bonega promenado, kolektado de fungoj kun bona lingva praktiko.

4) La mastroj zorgis pri stato de la aferoj en la grupoj, ĉirkaŭveturante la bivakojn (G.Jaskov kun sia aŭto kaj kutime - la geedzoj V. kaj R. Ebel). En la grupo gvidata de mi ili aperis dum fakte 4 tagoj trifoje! Tio ĉi plene sufiĉis kaj estis imitinda zorgo pri la gastoj.

Ĝenerale la PP donis al mi nur bonajn impresojn. Mi povas diri certe, ke se ĝin prepari antaŭe, do la mankoj, kiuj nepre aperos dum la periodo, ne influos la ĝeneralan organizon de la aranĝoj kaj nenio fiaskos. Ili restos nur mankoj surfone de bona organizo. Alikaze ni obstine kaj senespere serĉados en ĝenerala malbono de la organizo iujn etajn pozitivajn flankojn, por iom praviĝi.

Bela vetero akompanis PP-on, la lago donis al ni plezuron de naĝado. Mi vidis, kiel rapide miaj grupanoj komencas kontakti, interamikiĝi. Mi kaj mia edzino Marina ricevis grandan grupon: 18 geknaboj el diversaj urboj - tre interesa kompleto! Tamen dekomence nia sola frazo estis: "Ne krokodilu!". Klariĝis, ke gvidi kaj instrui estas ne tiom facila laboro, do en nia familio tendo ĉiuvespere okazis pedagogiaj diskutoj. Kion ni konkludis? La kondiĉoj estas bonegaj, sed... ne taŭgaj por instruado en tiu senco, kiun komprenas plejmulto da instruistoj. Mia sperto de la movadano kaj ŝia sperto kaj supera klero de pedagogio trovis bonan kompromison: ili (niaj edukatoj) sunbruniĝu, naĝu, promenu, ripozu - bone! Ni ne faru

idiotaĵon - organizon de 2 - 3 -horaj studlecionoj sub karese brilanta suno kaj apud alloge moviĝanta freŝa laga akvo. Ne! Sed ni diris: "Geamikoj! Memstare ripetu tion, kion vi ankoraŭ ne scias en la lernolibro de Kolker - okazos ekzamena konversacio fine de la periodo. Ni malpermesas al vi krokodili: se vi ion ne scias diri - tuj demandu nin kaj ni nepre respondos. Ne timu diri nekorekte, ne timu erari, timu krokodili!". Ankaŭ ni, geaktivuloj, decidis kontroli severe ĉies paroladon kaj ne riproĉadi la "pekulojn", sed tuj traduki iliajn krokodilajn eldirojn, klarigante kaj petante pripenson. Jen kia estis nia metodo dum PP.

Dank' al la mastroj ni havis liston de niaj edukatoj, kie estis indikitaj ankaŭ iliaj lingvoniveloj antaŭ la tendaro. En nia grupo kolektiĝis precipe la kategorioj "elemente" kaj "kontentige". Kaj kiam ni organizis la ekzamenan konversacion dum la lasta tago, ni miris kaj ĝojis - ĉiuj, krom du, altigis sian nivelon je unu ŝtupo, kaj kelkaj - eĉ je du ŝtupoj (ekzemle, de "elemente" al "bone"). Necesas diri ankaŭ, ke plejmulto kondutis sufiĉe disciplineme en lingva senco.

Mi ne finas la parolon pri mia bela PP-grupo, ĉar kiam ni ĉiuj revenis en la tendarejon, klariĝis, ke ni (same kiel la ceteraj grupestroj) devas gvidi niajn "aristokratojn" (tiel titoliĝis la grupo) ĝis la fino de la tendaro. Ĉu tio estis bona aŭ ne, vi ekscios en la sekva parto de la artikolo.

II. Esperantistoj en pionira tendarejo.

Oni renkontis nin severe. "Dancu!" - ordonis R.Zaĥarĉenko. Ni dancis. "Kantu!" - denove ŝi. Ni kantis. "Nu, estas veraj esperantistoj" - sate diris G.M.Gercikov. Kaj ni eniris la tendarejon.

...Apude kuŝis salita lago. Belaj dometoj, akvoturo, klubejo, manĝejo, radiostacio (organizita de G.Jaskov), centra placo kun tribuno. Antaŭ kelkaj tagoj ĉio ĉi apartenis al pionirij, hodiaŭ - ni iĝis mastroj de tiu ĉi bela loko, apud pinarbaro.

Kiam ĉiuj lokiĝis... Interalie, kiel mi komprenis nun, la organizantoj faris saĝe: dislokigis ĉiujn laŭ PP-grupoj. Tio ĉi helpis al daŭra amasa interkoniĝo de ĉiuj kaj al pli oportuna gvidado. Ĉar dum la tuta tendaro konserviĝis organiza vivo kaj gvido laŭ la PP-grupoj (sed ne laŭ urbaj delegacioj), kaj tio havis grandegan edukan signifon. Uzante mian sperton de la tendarpartoprenoj, mi tute certe diras: tiu ĉi tendaro tre bone edukis novajn geesperantistojn, ili havis grandegan atenton al si flanke de la aktivularo. La daŭra ekzisto de la PP-grupo en la tendaro, sub gvido de la samaj spertuloj kaj pluse la ceteraj alvenintaj instruistoj kaj E-aktivuloj - tio ĉi ege influas plej rapidan kaj amasan enkondukon de la komencantoj en la vivon kaj zorgojn de Esperantujo, en la sencon kaj celojn de la movado.

Do, kiam ĉiuj lokiĝis, oni vokis la tendaranojn al la solena malfermo. Ĉi-jara orienta Esperantujo pasis sub du standardoj: tiuj de Sovetunio kaj de Esperanto. Hisis ilin du plej junaj getendaranoj O.Paŝĉenko (Omsk) kaj I.Gercikov (Talgar). Malfermis la tendaron V.Jakovlev (Barnaul). Sekvis la tradiciaj paroloj kaj salutoj de malnovaj kaj novaj kluboj.

...Kaj komenciĝis la ordinara kaj neordinara Tendara Vivo.

Komence pri kutimaj eroj de la programo. Ĉi-jaran E-Universitaton bone gvidis V.V.Samodaj (Moskvo). Oni prelegis precipe pri movadaj temoj, sed okazis ankaŭ ekstermovadaj diskutoj. Interesajn prelegojn kaj pridiskutojn oni organizis pri la 63-a UK en Varna: rakontis V.V.Samodaj, I.Danilin (Krasnojarsk), V.Jakovlev, G.Jaskov, J.Vdovin (Barnaul). Plejmulto de la paroloj havis bonan analizon (krom simplaj impresoj) kaj iom tuŝis la proksimiĝantajn novajn kondiĉojn.

Estis tre rimarkinda mitingo omaĝe al la 60-jara jubileo de VLKŜM kaj al la XI-a festivalo de junularo kaj studentoj: al tiuj eventoj estis dediĉita la tendaro. Tie oni bone kaj pasie parolis

pri taskoj de junaj esperantistoj, pri rolo de Esperanto en la nuntempa socio, pri loko kaj celoj de la esperantistaro, pri internaciisma agado de esperantistoj. Oni akceptis decidojn de la mitingo, kiuj enhavas rekomendojn por agado de orientaj E-kluboj.

Por la plej obstinaj "krokodiloj" estis organizitaj du gravaj aferoj: speciala paroliga kurso kaj Verda milico (V.Sapoĵnikov). En normalaj PP-grupoj okazis normalaj paroligaj kursoj.

Interese pasis vespero de konatiĝo, gaja vespero, vespero de naskiĝintoj, komuna koncerto, KGS, Neptun-festo. Jen kelkaj impresoj.La vesperon de konatiĝo oni preparis laŭ grupoj, kaj ĝi fakte iĝis granda koncerto fare de la komencantoj. Ili gaje prezentis sin (kelkaj eĉ forgesis tion fari, tiom ili okupiĝis pri la belarta flanko de la afero!). Nia grupo prezentis teatraĵeton laŭ "Pigmalion" kun plene E-igita scenaro, kunknaboj en virinaj roloj kaj inverse.El la gaja vespero memorindas du eroj: teatraĵeto de Gercikov-grupo - trafa parodio "E-familio" kaj "scienca prelego" "Pri utilo de tabako kaj alkoholo" de S.Kim (Alma-Ata).

Ĝenerale rimarkinda estas la fakto de amasa partopreno de la komencantoj en ĉiuj tendaraj aranĝoj.

Originale oni organizis Neptun-feston. Ĉar la vetero en lastaj tagoj estis tre malbona, la organizantoj ĉion pripensis kaj organizis la feston en... la klubejo. La pekulojn oni trempis en grandegan sitelon kun akvo, levante je la piedoj. La mastro V.Ebel trafis tien eĉ dufoje - pro la "eraro", antaŭe planita. Neptuno (G.Gercikov) aspektis serioza kaj bonkora dio, havis aron da anĝeloj kaj diabloj. Teatreco, kompozicieco akompanis la aranĝon same kiel akvo kaj gajo.

Sufiĉe interese pasis koncerto por aborigenoj (ĉeestis ĉirkaŭ 60 personoj). Mankis talentoj en la belarta konkurso, sed tio ĉi estas senpere ligita kun la ĝenerala manko de aktivuloj en la tendaro. Tamen estis interesaj verkoj kaj elpaŝoj: G.Gercikov (Talgar), V.Ĉaldajev (Barnaul), S.Miĥajlin (Krasnojarsk).

...Kiom ajn oni ne volas tion, sed venis en la tendaron la sopira tago de adiaŭo. Dum la ferma kunveno V.Sapoĵnikov nome de Krasnojarska E-klubo invitis ĉiujn ĉeestintojn al OrSEJT-21. Do, la stafeto daŭras malgraŭ ĉio! Vespere okazis adiaŭa balo - gaja, trista, la lasta... Dancoj, biero, ludoj, aŭtografoj. Multaj tendaranoj jam estis forveturintaj, restis iom pli ol duono. Estis elektitaj "Miss" kaj "Mister" de Esperantujo-78: la honoron ricevis A.Silantjeva (Ufa) - belulino kaj aktivulino, kaj V.Sapoĵnikov - pri beleco oni ne parolu, sed aktiva ĉefo de Verda milico. Al ambaŭ estis enmanigitaj belaj donacetoj kaj medaloj. Al aktivuloj, kiuj donis multajn fortojn por organizo de la tendara vivo kaj programo, por diversaj laboroj en la tendaro, estis tre agrable ricevi donacetojn de la Tendara Estraro, kio tre kortuŝis ĉiujn.

Kion mi povas konkludi pri la tendaro? Severa lingva disciplino. Tre efika edukado de la novuloj. Sufiĉe altnivela amasa partopreno de la komencantoj en la tendara vivo. Malgraŭ la malbona vetero, bona humoro de la esperantistaro. Gepatreca zorgo de la mastroj pri ĉiu tendarano.

La tendaron organizis Barnaula E-klubo, kiu antaŭ 10 jaroj faris la 10-an SEJT en Altajo. Malgraŭ ke la klubo nun rekonstruiĝas, travivas ŝanĝon de generacioj, iom laciĝis, la barnaulanoj tutegale restis fidelaj al siaj bonaj tradicioj, kaj ni danku ilin pro la bone organizita tendaro. Mi kredas, ke ĉion, kion oni povis fari - ili faris. Dankon, geamikoj! Dankon, Volodja kaj Roza! Ni ne forgesu ankaŭ la ceterajn: V.Jakovlev, V.Ĉaldajev, G.Jaskov, J.Vladimircev, N.Snastina, J.Vdovin k.a. Kiam ni estis forveturantaj - ni ploris. Ĉu vi komprenas?..

Ĝis la revido en OrSEJT-21!

V.Sapoĵnikov (Krasnojarsk).

## ADAPTIĜI AL NOVAJ KONDIĈOJ

La fondo de ASE okazas en atmosfero de sekretemo (ekz., ĝia statutprojekto ne aperis en "A"). Nature, antaŭ membroj de SEJM-kluboj leviĝas multaj demandoj. Ĉu ASE daŭrigos tradiciojn de SEJM, ĉu ĝi estos alirebla por ĉiu E-grupo? Kiu ĝin gvidos - ĉu tiuj, kiuj konas bone la movadon kaj bone rekomendiĝis en ĝi (ekz., A.Gonĉarov, B.Kolker, V.Aroloviĉ, P.Jegorovas), aŭ tiuj, kiuj ĉiel evitis kontaktojn kun SEJM? Ĉu ne ĝenos gvidantojn de ASE laŭte rekoni meritojn de SEJM?

Kiujn taskojn frontas ni en la nuna situacio? La artikolo de A. Melnikov ("A"-3, p. 33 - 36) ne respondas la demandon. Li fakte priskribis, kiel devus ĝenerale funkcii bona E-klubo. Nu, tia artikolo povus aperi antaŭ 3 aŭ 5 jaroj, ne nepre nun.

La enhavon de nia estonta agado kadros la akceptota statuto, direktos la elektotaj gvidantoj. Ni zorgu (ĉu tio eblas?), ke la statuto estu labordona, la gvidantoj - agemaj. Nia tasko estu - adaptiĝi al novaj agadkondiĉoj. Por plenumi tion, kio en la antaŭaj cirkonstancoj ne eblis.

Ĝis nun ni preskaŭ nenion povis eldoni, ne ĉiam povis instrui al ĉiuj dezirantoj (pro rifuzo de ejoj, foresto de lerniloj, vortaroj), eĉ ne ĉiam kunvenadi... Ni havis dezirojn, sed ne rajtojn. Mi esperas, ke ASE disponigos ĉiujn rimedojn por deca peresperanta prezento de niaj naciaj kulturoj eksterlande ktp. Por ĉi tia laboro estas bezonataj homoj (ni instruu ne al elektitoj!).

Ni jam delonge pruvis, ke Esperanto estas taŭga propagandilo ideologia kaj kultura. Ni esperu, ke ni ne plu devos pruvadi tion al ĉiu nova oficialulo, sed dediĉi la tempon al praktika utiligo de la lingvo.

V.Ŝilas (Vilnius).

## NE DECAS RAPIDO EN GRAVA DECIDO

Nia esperantistaro jam delonge strebis al oficialiĝo. Ĉiam al ni malhelpis necertaj rilatoj al nia movado, foresto de oficiala Sovetunia E-revuo ktp. Preskaŭ spontane, dank' al penoj de kelkaj ardaj kamaradoj ekestis SEJM - formo de kunlaboro de junularaj E-kluboj en nia lando. SEJM brile pruvis sian vivkapablon kaj fakte dum multaj jaroj estis la sola organiza forto de tuta E-movado en nia lando.

Kaj do, nun ni staras sur la sojlo de novaj grandaj kaj sendube pozitivaj ŝanĝoj - kreo de ASE.

Ŝajnas, ke ĉio klaras. Ekzistos ASE - oficiala organizo, havanta taskon reprezenti nian landon en la monda E-movado, ia organiza forto. Okazos kunlaboro inter kluboj, kaj estos bezonata formo de kunlaboro de E-kluboj. Sed la formon de kunlaboro ni jam havas! Se al iu ne plaĉas la stranga titolo SEJM - ni ne estu obstinaj. Povas ekzisti junulara sekcio de ASE, eble turisma sekcio, ne gravas la titolo! Estu "Somera Feriado", kiun anoncas laŭvice plej fortaj junularaj kluboj, kaj al kiuj venas gastoj, pridiskutantaj problemojn de junulara movado. Tiel ni konservos la akiritajn ĝis nun riĉajn tradiciojn de niaj tendaroj, de niaj renkontiĝoj, de niaj sinceraj diskutoj kaj someraj universitatoj...

Tiel devus esti laŭ logiko. Sed okazis alie...

En la tendaron "Esperanto kaj naturo" oni alportis novaĵon - pri decidoj de apudmoskva SEJM-Konferenco. Se ni korekte komprenis, temis pri memlikvido de SEJM! Ĉesos ekzisti gajaj E-tendaroj, kaj ĝenerale ĉi tiu Konferenco estis la lasta.

Fakte okazis tute ne konferenco, ĉar ĝin partoprenis plejparte nur preterveturantoj al UK en Varna, do tute ne reprezentantoj de kluboj (?! - vidu la lastan alineon de la konferenca statistiko en

"A"-1, p.12. - La red.). Interalie, nur el 17 SEJM-urboj (triono de kluba nombro), 47 partoprenintoj. Kaj tiu ĉi dubinde reprezenta Konferenco laŭ iniciato de SEJM-prezidanto Melnikov akceptis decidon meti en ĉerkon kaj prepari al kremacio SEJMan kadavron! (La legantoj bonvolu kompari ĉi tiun aserton kun la Decidoj, fakte akceptitaj de la Konferenco: "A"-1, p.11. - La red.)

Mi ne aŭdis vortojn, per kiuj Melnikov sukcesis konvinki ĉiujn fari tiun decidon. Restis nur lavi la manojn, kiel faris en antikvaj tempoj Pilato post sia decido. Eble li diris, ke ĝis nun ni, esperantistoj, faris danĝeran por nia ŝtato subplankan laboron, pri kiu ni devas nur rezigni. Mi ne povas kredi, ke niaj junaj kamaradoj, partoprenintaj la Konferencon, samopiniis kun tiu aserto!

Mi estas malnova komunisto, partoprenis la militon, la tutan mian vivon mi edukis junularon, kaj mi fiere faris mian E-laboron, opiniinte kaj opiniante ke la E-agado utilas al nia ŝtato, al nia Partio! Celo de SEJM estas "...praktika utiligo de Esperanto por propagandi la sovetan ideologion kaj la kulturojn de sovetaj popoloj eksterlande surbaze de la proleta internaciismo...". Tiel ni faris kaj faros malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj, kaj honti nian agadon mi ne intencas.

Same mi opinias, ke neniu el nia anaro supozas ke nia agado sur E-kampo estis iel malutila al nia ŝtato. Do, kialoj de la likvidemo en SEJM havas psikologian klarigon. Povas esti unu el du klarigoj. La unua: la likviduloj estas novaj, ne harditaj en E-agado homoj. Ili timas daŭrigi la agadon. Kaŭzoj por timo estis eble en la sesdekaj jaroj, kiam okazis fondo de SEJM. Tamen la fondintoj nun jam ne estas tiom junaj, ili lasis siajn postenojn al pli junaj, kaj por la lastaj nulas la riĉaj tradicioj de nia movado, streĉa internacia agado, eblo de gaja E-feriado, edukado de novaj esperantistoj. La dua klarigo estas pli akra. Iuj diras, ke ideo kondamni kaj nuligi SEJMon, kun samtempa ĝia fiigo, kompromito de ĝiaj celoj kaj atingoj estas konscia. "Jen, rigardu: mi mem mortigas la venenan hidron, mem kraĉas al eksaj fiamikoj - bonvolu doni al mi pro tio iun varman postenon..." Mi mem ne konsideras tion - tio estus tro.

Likvido de SEJM devigus ASE komenci ĉion de nulo: la ellaboritaj kaj harditaj en praktiko spertoj de E-agado pereus, same kiel almenaŭ duono de la E-kluboj. Konscie fari tion ne eblas.

Tamen en "A" troveblas vortoj: "Pridiskuti ĝin (projekton de Regularo por fakoj de SEJM - G.G.) ne indas, ĉar ĝi funkcios nelongan tempon." "Necesas pripensi, ĉu ni planu SEJTojn por la sekva jaro aŭ jam ne." Malindaj vortoj! Mi hontis, leginte ilin. Kiel bone, ke aliaj konferencanoj ne samopiniis kun Melnikov!

(Kun la unua el la ĵus cititaj frazoj la konferencanoj fakte konsentis: oni akceptis la Regularon sen pridiskuto. La dua fakte ne esprimas negativan aŭ pozitivan opinion de A.Melnikov mem pri la estonto de SEJToj: per tiuj vortoj li nur instigis ĉiujn al la pridiskuto. - La red.)

Kaj nun - miaj konkludoj. Venis tempo de gravaj decidoj. Dum veno de novaj kondiĉoj ni devas havi en SEJM-Konsilantaro homojn, kiuj staris ĉe la lulilo de nia movado, de SEJM. Ili havas moralan rajton akcepti ĉiujn gravajn decidojn, ili havas grandan sperton, havas necesan kuraĝon, havas bonajn, neperdeblajn kapojn. Por tio mi proponas urĝe organizi perleteran elekton de SEJM-Konsilantaro. Liston de kandidatoj necesas kompili el plej malnovaj SEJM-anoj. Komenci la liston devus laŭ mi la nomoj de A.Gonĉarov, V.Samodaj, B.Kolker, A.Medinŝ... Mi ŝatus vidi en la listo tiujn de V.Sapojnikov, M.Bronŝtejn. Post la elekto restu dek - laŭ plimulto de voĉoj. Tiu deko decidu, kolektiĝinte kaj pripensinte la aferon. La oficvojaĝojn pripagu SEJM-kaso. (La legantoj estas petataj pripensi, ĉu la propono estas iel ajn akordigebla kun la paragrafo II.1 de la SEJM-Regularo. - La red.)

Kaj laste, pri SEJM-kaso. Tio estas SEJMa mono, apartenanta al

la esperantistaro. SEJM vivos, malgraŭ ĉio. Estos alia titolo, tamen iu formo de kunlaboro de la E-junularo restos! Ĝis tiu tempo la kaso restu en la manoj de D.Cibulevskij, li estas tute honesta kaj konfidinda homo. La monon SEJM ankoraŭ bezonos, kaj estus miopege malaperigi iel ajn la kason.

Dum la Konferenco estis propono pri transdono de la kaso al la Fonduso de Paco. Mia opinio estas, ke ankaŭ nia E-agado estas grava, kaj tre utila formo de porpaca laboro. Kaj por urĝaj aferoj nia E-movado ankoraŭ bezonos monrimedojn. Kompreneble, tio estas mia persona propono. Tamen ĉi tiun demandon eblus aperigi en dissendota elektbulteno, kiu eble povus aspekti kiel enketo, enhavanta kelkajn demandojn pri opinio de SEJM-kluboj.

G.Gercikov (Talgar).

## NECESAS TRASTUDI - KAJ POSTE KONKLUDI

Komence - tasketo el psikologio.

Iu homo tre longe atendis feston. De multaj fontoj li aŭdis, ke ĝi estas rava, gaja, humurplena, superas ĉies atendojn kaj ajnajn aliajn festojn - unuvorte, neforgeseblas.

Kaj jen la festo venis. Kion sentas la homo?

SPLENON KAJ ANGORON!

Ja plenumiĝo de ajna revo estas ege malpli agrabla ol atendado de ĝia baldaŭa realiĝo. Atinginte la celiton, la homo sentas certan malkomforton, ĉar la celo, al kiu li dediĉis tiom da vervo, energio kaj fortoj, ne plu ekzistas; endas ĝin propramane entombigi kaj serĉi la novan. Tio estas afero nek ĝojiga, nek facila.

Io simila okazas en nia medio.

Dum pluraj jardekoj ni revadis pri oficialiĝo de la movado - kaj jen ĝi jam preskaŭ percepteblas. Ni preskaŭ ricevis tion, al kio strebis dum la plej bonaj eroj de nia vivo. Kaj nun ni sentas nin perditaj.

Nu, tio estas teoriumado. Oni atendas de mi alion. Do, konkretaj oponoj al s-ano Gercikov.

1. Pri SEJMa pasinto. Diskuti ne necesas. Indas nur aldoni, ke la nuna Asocio kaj generale la nunaj cirkonstancoj (nepre pli favoraj al ni) iĝis eblaj preskaŭ nure dank' al SEJM. Ni pruvis, ke Esperanto ne estas ia malutilaĵo, nevivkapabla absurdaĵo aŭ elmodiĝinta hobio.

2. SEJM ĉiam strebis al oficialeco. Kaj kiam ekĝermis la eblo iel influi la Asoci-kreadon, SEJM tuj entreprenis ĉion, kion povis, por ke la kreotaĵo kontentigu la bezonojn de nia movado. SEJM-komitatanoj kune kun aliaj aktivuloj havis plurajn aŭdiencojn ĉe certaj postenuloj, partoprenis ellaboradon de la Asocia regularprojekto, preparis raportojn pri la agado de SEJM, liveris arojn da sugestoj kaj proponoj al SSOD.

Sen SEJM SSOD apenaŭ sukcesus prepari ĉion bezonatan por la Fonda Konferenco.

3. La agado de SEJM fakte ampleksis tiun de landa E-asocio (kaj superis la agadon de multaj L.A.). "De-fakto" ĝi estis L.A., "de-jure" SEJM entute ne ekzistis.

La situacio estis nenormala, sekve malstabila. Ĉio nestabila ne povas ekzisti kiom ajn longe. Eblis la du solvoj: aŭ SEJM malaperos, aŭ oficialiĝos.

Se la agado de SEJM estus danĝera por la ŝtato (tian aserton imputas al mi s-ano Gercikov), la ŝtato jam antaŭlonge likvidus "la bandon". Kaj tute prave, ĉar laŭ niaj leĝoj, same kiel laŭ leĝoj de ajna lando, kontraŭŝtata agado estas punenda krimo. Sekve - deklari, ke SEJM malaperos pro tio, ke ĝi agadis kontraŭ la ŝtato, estus absurde.

4. Tamen, ĉu SEJM malaperos aŭ oficialiĝos? Nek, nek.
Verŝajne por ĉiu estas evidente, ke aktivi en E-movado kaj profesie labori en ĝi estas tute malsamaj aferoj.
SEJM estis kaj dume restas reto de kluboj aŭ alivorte aro da aktivuloj, el kiuj NENIU laboris por Esperanto profesie (profesinivele - eble jes). Sekve, same kiel amatora teatro ne povas per simpla alinomiĝo fariĝi profesia, SEJM ne povas mekanike transformiĝi al la Asocio.
Do, ne eblas aserti, ke SEJM oficialiĝos (aŭtomate).
Sed kiu konsistigos la Asocion? Plejparte la samaj kluboj (kaj homoj), kiuj apartenas al SEJM.
Sekve, aserti, ke SEJM simple malaperos, ankaŭ ne eblas.
Kaj se en la Asocio kreiĝos junulara sekcio, kiu transprenos la plej esencajn trajtojn de SEJM, paroli pri malapero estus eĉ ridinde.
SEJM kiel SEJM certe ne plu ekzistos post kiam la Asocio ekokupiĝos pri ĉiuj funkcioj, kiujn dume plenumas SEJM. Sed komprenante ke tio estos daŭra procezo kaj dezirante helpi al la Asocio, SEJM plu okupiĝos pri tio, kion la Asocio ankoraŭ ne sukcesos ekzorgi, kaj kiam la Asocio ne plu bezonos nian helpon, ni, SEJM-anoj, kune voĉdonos pri la likvidiĝo.
Kompreneble, por multaj el ni SEJM estas ne ia "formo de kunlaboro", sed parto de la vivo (kaj kia parto!). Tamen endas komreni, ke:
1) la superaj oficialaj instancoj jam decidis, ke la centro de la E-movado en USSR estu la Asocio; du centroj ekzisti ne povas kaj evidente superfluas;
2) se SEJM malaperus abrupte, tio ne utilus al la Asocio; tial SEJM plu helpos al ĝi ĝis la momento, kiam la helpo ne estos bezonata;
3) pri la definitiva sorto de SEJM tutegale decidos la tuta SEJM-anaro per voĉdonoj;
4) kvankam SEJM kiel SEJM ne plu ekzistos, restos la kluboj kaj la homoj, de kiuj finfine dependos la pluà sorto de la movado en nia lando; ili plu flegos kontaktojn inter si (antaŭ ĉio la korespondajn, sed ankaŭ la personajn), plu efektivigos kluban laboron, plu partoprenos somerajn tutlandajn aranĝojn, kies organizadon helpos ekde nun komsomolo kaj sindikatoj, plu sugestados al la ASE-estraro utilajn formojn de laboro; do, pluraj tradicioj de SEJM povos resti, se ĉiuj SEJM-anoj zorgos pri tio.
5. Iom pri la 12-a SEJM-Konferenco.
Ĉu iu el vi meditis pri kialoj de ĝia sendube malalta nivelo? Mi - jes. Kaj la ĉefan kialon trovis en nia amatoreco (en la plej malbona senco de la vorto; amatoreco en la senco: senpaga laboro de entuziasmuloj en libera tempo - estas unu el niaj atutoj).
Kiu veturadis al la konferencoj? Ĉu delegitoj? Ne. Tiuj, kiuj havis emon, libertempon kaj monon. Sufiĉis manko de io el la tri - kaj jen la rezulto: en la 12-a reprezentiĝis nur ĉirkaŭ triono de la kluboj. S-ano Gercikov mencias 47 partoprenintojn. Fakte eĉ malpli, ĉar jam enradikiĝis kelkies opinio, ke la konferencoj estas bonega rimedo por ripozi.
Mi ne estas kontraŭ pluraj konferencaj maltrivialaĵoj: nekutimaj (subĉielaj) kunvenejoj, neordinara maniero aŭskulti (kuŝante, sidante aŭ aliumante), pli ol neformalaj paroloj ktp. Malinklino al ŝablonoj kaj al formaleco estas laŭ mi unu el multaj atingoj de SEJM. Sed se el, ni diru, 100 konferencanoj partoprenas la kunsidojn 20 - 50, indas enpensiĝi.
SEJM faris nekredeblan multon. Sed en la lastaj jaroj ĝi komencis iom degeneri. Kial? Ĉar preskaŭ (aŭ tute) ĉion, kion SEJM povis fari sen oficialeco, ĝi jam faris. Ĝi atingis la stadion, kiu postulas sisteman, profesian gvidadon kaj novan statuson en la socio.
Sufiĉas rememori, kiom multe planis dum la lastaj jaroj SEJM-komitatanoj kaj aliaj aktivuloj kaj kiom malmulte ili realigis. Ĉar

tion, kien ĉiu normala organizo povus efektiviĝi sen penoj kaj tempoperdoj, ni devis realigadi kun enormaj streĉoj.

SEJM vivas ne en vakuo. Dume ĝi similas al nekomprenebla fremda (kvankam ne doloriga) korpo en la granda organismo.

Eble iu diros, ke pri la lastaj regresoj kulpas la Komitato (unuavice le prezidanto). Povas esti ("fiŝo putras ekde la kapo"). Sed eĉ se tiel, la fakto estus nur unu plia argumento por miaj asertoj pri la malprospero. Se SEJM evoluus normale, ĝi trovus pli taŭgajn gvidantojn.

6. Kaj laste, kelkaj vortoj pri mi mem.

En la artikolo kaj pli eksplicite en sia letero al mi s-ano Gercikov asertas, ke mi estas aĉa malkuraĝulo aŭ fia karierulo, kiu perfidas siajn amikojn. Pli latente diris alia samideano. Eble aliaj samopinias.

Nu, ĉiu rajtas pensi, kion li/ŝi volas. Mia plej alta tribunalo estas la propra konscienco - kaj antaŭ ĝi mi estas pura.

Tamen se la SEJM-anaro opinias, ke mi ne taŭgas por la prezidanteco, mi ĉiumomente pretas eksiĝi.

A.Melnikov, prezidanto de SEJM (dume).

## PROPAGANDO DE ESPERANTO ESTAS KORO DE NIA MOVADO

Estas tre malfacile skribi ankoraŭ unu artikolon pri tiu ĉi eterna temo de niaj diskutoj - Esperanto-propagando. Mi mem jam kelkfoje skribis, ankaŭ multaj aliaj samideanoj. Ĉi-jare oni elektis min estro de la populariga fako, kaj mi komencis pensi: pri kio fakte mi devas okupiĝi? Jen - laboris A.Medinŝ sur ĉi tiu posteno. Tamen rezultoj estis "de loka signifo", ĉu ne? Ja mi ekzemple opinias, ke la fako devas labori landskale, por tuta Sovetio. Rekomendojn por E-laboro surloke oni donadis ĉiam, ankoraŭ antaŭ la apero de SEJM. Sed malmultaj komprenis kaj des pli malmultaj ion faris por direkti unuecajn fortojn de SEJM-kluboj al iu sola konkreta kampanjo, atingo de la sukceso kaj venko en tiu kampanjo.

Komprenu min ĝuste, geamikoj! Mi tre bone scias plejmulton da provoj ĉi-flanke - en la sfero de amasa E-propagando, - entreprenitaj de SEJM. Estis provoj organizi kampanjojn, sed ĝis "la venka fino" neniu el ili estis kondukita. Eble mi eraras, sed eĉ se estis venkoj, tutegale mi certas: ne estis sistemo en la propagando. Kaj ne estas ĝis nun.

Kion mi volas akcenti? En tiu ĉi artikolo ni starigu antaŭ ĉiuj niaj kluboj kaj SEJM-aktivuloj konkretan taskon kaj laboru ĝis la venka fino. Poste - starigu ni la sekvan, eble paralele kelkajn.

Kaj nun, konkrete, kiel ni organizos la laboron de PF por tiu ĉi agadjaro kaj proksimestonte.

Por bone propagandi Esperanton unuavice necesas havi taŭgan literaturon, ian propagandan fonduson. Se paroli pri E-klubo - ĝi devas konstante kompiladi sian E-bibliotekon; necesas speciale atenti kolektadon de diversaj E-materialoj, taŭgaj en propaganda agado: priesperantaj artikoloj, eldiroj de famuloj, memoraĵoj de E-veteranoj, afiŝoj, fotoj, lumbildoj, filmoj pri E-temaro, materialoj pri historio kaj nuntempo de E-movado, faktoj pri utilo de Esperanto por la socio, ĝia uzeblo en diversaj sferoj de homa agado ktp.

Reale tio ĉi aspektas tiel: kompletoj de nacilingvaj ĵurnaloj kaj gazetoj kun E-materialoj, foto-, kino-, lumbildo-, fonotekoj, propaganda fonduso de la klubo (paperujoj kun tajpaĵoj pri E-temaro), konstante kompletigata biblioteko de E-literaturo, arkivo (paperujoj kun enlanda kaj eksterlanda korespondado de la klubo, la kluba dokumentaro), aliaj materialoj. Al tia sistemigo devas strebi ĉiu E-klubo. Ankaŭ apartaj E-aktivuloj devas riĉigi siajn propagan-

dajn arsenalojn, akirante, sistemigante kaj uzante novajn propagandaĵojn.

Por sisteme, science propagandi surloke, necesas bone organizi la propagandon. Por tio vi devas havi imagon pri informkanaloj, tra kiuj vi propagandas. Kompilu adresaron de lokaj instancoj. Endas fari adresaron de ĉiuj gazetoj kaj ĵurnaloj, aperantaj en la urbo (regiono, respubliko), lokaj TV- kaj radiostacioj. Ĉiujn adresojn vi ne kolektos, sed strebi al tio necesas.

Do, vi havas la adresaron, kio plu? Prenu tipan artikolon pri Esperanto, bone multopligu ĝin (aŭ per rotaprinto, aŭ - skribe, tajpe, sed ne sendu kopiojn!) kaj dissendu kun enkonduka letero al la redakcioj. Tion ĉi necesas fari, se vi ne povas interkontakti senpere kun la redakcio, ne havas "specialan homon", kiu mem skribus artikolon pri la temo. Do vi komprenas, ke por ĉiu redaktoro via sendaĵo devas aspekti respektinde. Ne malbonus aldoni iujn E-materialojn, atestantajn vian seriozecon (fotoj, libroj, afiŝoj ktp.). La praktiko montras, ke almenaŭ 40% de la redakcioj ne ignoras vian materialon. Jam tio ĉi estas grava kaj montras utilecon de la afero. Certe estos pli bone, se vi senpere "okupiĝos" pri la redaktoro, parolos kaj konvinkos lin per bonaj argumentoj. Tiel statas aferoj pri ĵurnaloj por vi atingeblaj.

Kun laborantoj de TV kaj radio oni certe devas senpere kontakti kaj proponi ne ion nebulan, sed aferece - konkretan scenaron, konkretajn partoprenontojn.

Ankoraŭ grave: se vi komencis kontakti kun laborantoj de la amasa informado, do plu faru tion konstante, sufiĉe ofte dum jaro (sed ne dum monato - ne tedu al ili!).

Nu, jen miaj rekomendoj. Ankoraŭ vi povas organizi lokajn kampanjojn. Ekzemple: konsilu al viaj geklubanoj, regionaj esperantistoj kaj interesiĝintoj skribi leterojn al via regiona (distrikta, respublika) ĵurnalo kun peto publikigi pli ofte materialojn pri esperantistoj kaj ilia agado.

Pri formoj de vasta E-propagando: kontaktoj kun lokaj instancoj, publikaj vesperoj (partopreno kaj organizo), partopreno en internaciisma agado, organizo de ekspozicioj kaj prelegoj - ni multfoje parolis kaj parolos ankoraŭ. Kaj nun - pri taskoj de SEJM-anoj en komuna tutsovetia E-propagando.

Ni rememoru Informan servon de SEJM. Oni sendadis al ĝia adreso diversajn materialojn pri la kluba agado, precipe: ĵurnalojn kaj gazetojn kun E-publikaĵoj, afiŝojn, programojn, invitilojn ktp. Kutime - po 50 kaj pli da ekzempleroj. La servo ĉion resendis al la kluboj - sendintoj, sed po unu ekzemplero de ĉiu veninta materialo. Ĉu utile estis por la kluboj? Sendube. Do ni daŭrigu kaj konsideru, ke IS translokiĝis en Krasnojarskon. Sendu laŭ nia adreso la materialojn - tio utilos unuavice por vi mem! Ni, krasnojarskanoj, niavice provos ne ne nur dissendi la materialojn de IS, sed ankaŭ kompili ĉiujare la propagandan fonduson (kiu jam fakte ekzistas en la klubo) kaj eldoni la "Propagandan kolekton" kun plej interesaj propagandaj materialoj de la agadjaro.

Mi, kiel la fakestro, krom la jam indikita devo (IS), vidas la taskon organizi propagandajn kampanjojn en tutlanda skalo. Ekzemple multobliginte iun alvokon pri amasa influo al iu gazeto kaj klariginte la temon kaj sencon de la afero, por ke ne estu miskomprenoj kaj sekve mispaŝoj, - ni dissendos ĝin al ĉiuj kluboj de SEJM. Kaj de vi, kara aktivulo, dependos - ĉu sukcesos la kampanjo, ĉu ne. Endos nepre reagi, skribi leterojn kaj privatajn kaj kolektivajn, Kaj -"ĝis la venka fino". Tiel ni povos"trabati" multajn instancojn, redakciojn ktp. Por anonci la kampanjojn la fako uzos dume la SEJM-informilon "Kurte". Por dissendo de la cirkuleraj leteroj, flugfolioj, "Informaj Kolektoj" ni uzos la adresaron de SEJM-Jarlibro. Kiu volas aparte kontakti kun PF - bonvolu anonciĝi. Ankaŭ la sub-

tenantoj de SEJM ne estos forgesitaj. Kiam venos la novaj kondiĉoj, ŝanĝiĝos ankaŭ la sistemo de informado kaj dissendado, sed ni ne ĉesigos nian kunlaboron ĝis tiam, kiam malaperos mem bezono pri ĝi. Pri ĉiuj ŝanĝoj ni informos la kunlaborontojn.

Ankaŭ per kanaloj de eksterlanda korespondado ni organizos diversajn kampanjojn, ligitajn kun influo al niaj cortaj instancoj (precipe la redakcioj, sed ne nur). Ankaŭ propagando de nia ideologio, vivmaniero, kulturo inter eksterlandanoj ne malgravas kaj eĉ devos okupi ĉefan lokon. Kaj ne primitiva propagando, sed organizita, saĝa, konvinka.

Karaj geamikoj! Ĉiu esperantisto sendube devas esti propagandisto, ĉar tiu ne estas esperantisto, kiu ne kapablas defendi sian aferon. Do mi esperas, ke PF estos subtenata amase. Ne pensu nur pri viaj lokaj interesoj: vi ja scias, ke la centro ĉiam influas la socian opinion surloke. Do ni certigu la centron pri nia utilo kaj bezono, por ke surloke estu plej pozitiva opinio pri ni kaj nia agado. Gajnos ĉiuj.

V.Sapoĵnikov, estro de PF.

## UNUAFOJE EN ARMENIO

Dum la novembra festo en Jerevan okazis la 1-a Kaŭkaza regiona E-renkontiĝo (KRER-1), dediĉita al la 150-jara datreveno de la unuiĝo de Orienta Armenio kun Rusio.

La renkontiĝon partoprenis 37 esperantistoj el 5 urboj de kvar respublikoj: Tbilisi (17), Jerevan (15), Moskvo (2), Zaporoĵje (2), Miass (1).

Necesas substreki du specifajn trajtojn de la renkontiĝo: ĝi okazis unuafoje en la historio de E-movado en Armenio, kaj ĝi estis organizita oficiale en kadroj de AOKS (Armena societo de amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksterlandaj popoloj).

La programo de la renkontiĝo estis (malgraŭ kelkaj organizaj mankoj) enhavriĉa kaj interesa. Ĝi komenciĝis de Solena malfermo en AOKS, kiun gvidis merita sciencisto de Armenio, membro de E-Akademio prof. G.G.Sevak. Membroj de Jerevana E-klubo N.Korĉagina, S.Maĉkalova, M.Gjulnazarjan parolis pri la temoj de la historio kaj kulturo de la armena popolo. Estas grave, ke pri la malfermo informis la Armena televido!

Dum sekvaj tagoj okazis ekskursoj al la antikvaj fortikaĵoj-monaĥejoj Garni, Geĥard, Eĉmiadzin, vizito de kinejo, promenoj tra la festa Jerevano. La plej impresa programero estis la Festa vespero, kiu okazis la 7-an de novembro en AOKS. Ĝi komenciĝis per literatura-muzika komponaĵo el kantoj, poemoj kaj dancoj de la armena popolo. Ĉiujn precipe ravis la poemoj de O.Tumanjan (tradukis G.Sevak) en brila plenumo de G.Danneljan. Post la komponaĵo ĉiujn atendis nacikutima riĉa ĉetablado, dum kiu oni abunde tostis, kantis, ludis...

S-ano E.Kapanadze invitis ĉiujn al sekva KRER, kiun oni planas post jaro en Tbilisi.

Finante la mallongan skizon pri la renkontiĝo en Armenio, mi volas esprimi dankon pro la memorinda evento al ĉiuj membroj de Jerevana E-klubo kaj precipe al A.Patatjan - ĉefa organizanto kaj inspiranto de la arango. Mi kredas, ke lia revo pri tutsovetia E-tendaro en Armenio nepre realiĝos.

L.Novikova, v/p pri renkontiĝoj.

## POSTMILITA JUNULARA E-MOVADO EN KIEVO

Fine de decembro ĉi-jara la Kieva E-klubo "Ora Pordego" festos sian 5-jaran datrevenon. La klubo renkontas la jubileon kun gravaj atingoj, akiritaj sub gvido de ĝia senŝanĝa prezidanto M.Lineckij: oficialiĝo, transiro al A-kategorio en SEJM k.a.

La klubo tamen estas mur ĉeno en la jam 20-jara postmilita organizita E-movado en Kievo. La junulara E-movado en nia urbo evoluis ondforme (kiel E-movado ĝenerale) kaj oni povas noti kvin gravajn ondojn: "Amikeco", "Lumo", E-klubo ĉe Ukrainia Sciencakademio, E-klubo ĉe Kieva Politeknika Instituto, "Ora Pordego".

La unua kieva E-junulara grupo "Amikeco" formiĝis enkadre de E-sekcio de Kieva Domo de sciencistoj kaj aktivis dum 1960-61. La grupon estris V.Molebnij, krome aktivis V.Bobin, D.Gorodeckij, V.Jiĥarev, J.Liŝanskij, L.Ljagina, J.Ŝĉogoleva k.a. Ĉefokupoj de la grupo estis aranĝo de vesperoj, prelegoj kaj renkontiĝoj, organizo de E-studrondoj en institutoj kaj entreprenejoj.

La duan ondon formis junulara E-grupo "Lumo", kiu ankaŭ formiĝis enkadre de la E-sekcio kaj aktive agis dum 1964-66. Ĝiaj prezidantoj estis laŭvice V.Bobin, O.Makovecka, V.Zacarnij. Inter aliaj aktivuloj notindas D.Beznosenko, V.Linĉevskij, A.Liveckij, V.Menjkovskij, R.Mirzojev, K.Velkov, D.Zenina, mezaĝulo A.Perelman. La grupo, plejparte studenta, estis bone organizita: ĝi havis statuton, enketojn, stampon, membrokotizojn, jarraportojn, do fakte iĝis klubo enkadre de la E-sekcio. Lumanoj partoprenis BETojn kaj aliajn E-aranĝojn. Plej gravaj iniciatoj de "Lumo", stimulintaj progresigon de parolata Esperanto inter E-junularo, estis Vespera E-Universitato (VEU), dum kiu oni prelegis en Esperanto pri sciencaj kaj aliaj temoj, kaj progresiga E-kurso por lumanoj.

Kiel tiam ĝenerale en Sovetunio, ankaŭ inter kieva E-junularo fortiĝis tendenco por izoliĝo disde pliaĝuloj. Tiel naskiĝis E-klubo ĉe Ukrainia Sciencakademio, organizita de J.Matvijiŝin en la akademia komunloĝejo kaj funkciinta dum 1966-71. Ĝin eniris ĉefe aspirantoj kaj aliaj junaj sciencistoj. La klubo entreprenis sciencajn kaj aliajn prelegojn en Esperanto, E-kursojn kaj aliajn aranĝojn. Inter originalaj iniciatoj de la klubo notindas perkantaj E-kursoj kaj peresperantaj kursoj de fremdaj lingvoj. La klubo agis tro izolite, kontaktante kun la E-sekcio fakte nur per sia gvidanto.

La sciencistojn sekvis studentoj de Kieva Politeknika Instituto. En 1968 bulgara aspiranto K.Velkov, bonega esperantisto kaj talenta organizanto, organizis E-klubon ĉe komsomola komitato de la instituto, baldaŭ oficialigitan. La klubanoj havis oficialajn membrokartojn kaj ricevadis konstantan subtenon flanke de la komsomola komitato. Kernon de la klubo konsistigis KPI-anoj, tamen estis ankaŭ eksteraj membroj. Inter aktivuloj de la klubo notindas L.Demidenko, A.Djaĉenko, O.Dubina, B.Majevskij, M.Oleŝĉenko, H.Oniŝĉenko, L.Osijuk, N. Smetanina, J.Ŝaporenko, S.Zarjanij, J.Matvijiŝin, mezaĝuloj M.Lineckaja, V.Miŝĉenko k.a. La klubo organizadis E-kursojn por studentoj kaj aliajn, ofte distrajn, E-aranĝojn. La klubo aktive kunlaboris kun la E-sekcio, kun la Ukraina E-komisiono, kun la sciencista E-klubo. Post forveturo de K.Velkov - vera motoro de la klubo - la agado iom eklamis, tamen la klubo sukcesis organizi apud Kievo en 1971 SEJT-13, ŝajne plej amasan en SEJT-historio, kun kelkaj eksterlandaj E-grupoj. Sed post SEJT la klubo baldaŭ ĉesis funkcii pro manko de kapabla organizanto.

La junulara klubo "Ora Pordego" formiĝis en sino de E-sekcio de Kieva Domo de sciencistoj surbaze de kurso gvidita de M.Lineckij. Komence ĝi konsistis el kelkaj personoj, inter kiuj krom la gvidanto menciindas O.Husakovska kaj S.Pohorila. Kiam en la Domo de sciencistoj la kondiĉoj malfavoriĝis kaj la E-sekcio ĉesis funkcii, la esperantistaro alibaziĝis en la klubon "Konstruisto" kaj tie ekdominis la junulara E-klubo "Ora Pordego". Post iom da tempo ĝi ensorbis ankaŭ pliaĝulojn kaj iĝis komuna E-klubo, tamen plimultas en ĝi junularo. Inter la junaj aktivuloj notindas S.Bolotov, V.Ĉarin, N.Daniljuk, A.Ĥoruĵij, O.Kerzjuk, J.Kovalĉuk, M.Mamedov, L.Ponomar, S.Prudko, O.Sakoviĉ, V.Ŝĉerbanj k.a., inter pliaĝuloj kaj veteranoj aktivantaj - M.Genin, M.Lineckaja, V.Miŝĉenko k.a. Sub lerta gvido de M. Lineckij kaj aliaj E-instruistoj la E-kursoj, aranĝataj dufoje jare

en tri klubejoj, konstante nutras la E-klubon por freŝaj aktivuloj. La aktivularo nombras 25 - 30 personojn, sed la rezervo konsiderinde plimultas. La klubo funkcias ritmece, laboras laŭplane, penas ekfunkciigi fakan strukturon. Oficialigita en formo de klubo de internacia amikeco, la klubo fruktodone laboras ĉi-kampe. La renovigita VEJ funkcias kun utilo. La gradigsistemo (A-, B-, C-atestoj) stimulas progreson. La klubo serĉas kaj trovas vojojn por pli efika E-laboro.

"Ora Pordego" kronas la "triadon" en la junulara E-movado: unueco - disiĝo - reunuiĝo kun la ĝenerala E-movado. La klubo optimisme rigardas en perspektivon.

V.Enko (Kievo).

MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO

FORMIĜIS ORGANIZA KOMITATO

por la fonda konferenco de ASE, okazonta en marto 1979. OK konsistas el 13 personoj: reprezentantoj de SSOD kaj aliaj oficialaj instancoj kaj aktivuloj de E-movado. Inter la lastaj notindas Honoraj Aktivuloj de SEJM S.Podkaminer kaj V.Samodaj, prezidanto de Lvova E-klubo A.Koroleviĉ, vicprezidanto de Moskva junulara E-klubo D.Perevalov. Unu el la plej gravaj taskoj de OK estas evidentigi la realan staton de la E-movado en la lando, de kio dependos multo en la estonta ASE-agado, i.a. la kvanto de etataj funkciuloj. Do ĉiuj E-kolektivoj, kiuj ankoraŭ ne faris tion, konsideru sia devo nepre informi al OK pri: a) kvanto de ĝenerale konataj E-istoj en la urbo (regiono, distrikto), b) kiom el ili estas organizitaj, laŭeble kun listoj. La adresoj: 103009 Moskvo, pr. Kalinina 14, SSOD, E-komissija; kopie al 121019 Moskvo, ul. Marksa-Engelsa 1/14, In-t jazikoznanija, M.I.Isajev.

LA REDAKCIO RICEVIS

- la almanakon "Amikeco", kajero 30. En la enhavo: materialoj memore al A.Rogov (J.Ojalo, S.Krajnov) kaj L.Tarkony ( H.Dresen, L.Jevsejeva, versaĵoj de la forpasinto), artikolo de V.Ŝilas pri "Muzo-78", originala rakonto de A.Kubulnieks, daŭrigo de fragmentoj el la taglibro de G.Taalmann, versaĵoj de E.Miĥalskij kaj E.Lippe, vojaĝnotoj de J.Ojalo, rakontetoj de H.Relvik kaj P.Aitai, tradukoj el estonaj, belorusaj, litovaj aŭtoroj.
- Informbultenon N$^o$4(12) de USEA. Ĝi estas dediĉita al la V-a USEA-Konferenco en Ĥmelnickij (5.-8.11.) kaj enhavas: raporton pri la Konferenco (plej gravaj momentoj: solena malfermo, vizito al la tombo de A.B.Rogov, metodika seminario, diskuto pri E-heredaĵo de A.B.Rogov, festa manifestacio, decidoj, statistiko), duonjaran raporton de USEA-estraro, adresaron de la konferencanoj.

MEMORE AL LA VETERANO

La V-a USEA-Konferenco, dediĉita al la memoro de A.B.Rogov, decidis anonci monkolektadon por surtomba monumento al li. USEA-estraro petas ĉiujn sendi 1 r. monon (dezirinde pogrupe kaj senprokraste) al: 280013 Ĥmelnickij, str. de 25-a Oktobro 43, Domo de kulturo, E-klubo, al Miĥajlenko Volodimir Fedoroviĉ.

NOVAJ PUBLIKAĴOJ

En N$^o$12 de "Vek XX i mir" aperis artikolo de D.Perevalov pri la jubileo de MEM. Oktobre TASS dissendis informon de la sama aŭtoro pri la E-lingvaj eldonoj de Konstitucio kaj la raporto de L.I.Breĵnev. Ĉu iuj lokaj ĵurnaloj publikigis ĝin?

FELIĈAN NOVJARON! SUKCESAN AGADON EN LA NOVAJ KONDIĈOJ! SEM-KOMITATO

La informilo estas sendata nur enlande! Fintajpita 22.12.78.
Ĉiujn materialojn por "A" sendu al 121019 Moskvo d/v Aroloviĉu V.S.